

Limeriko

Promenis vireto en pluvo
 kaj diris: „Ja estas diluvo!“
 kaj malseka atingis
 sian hejmon kaj vringis
 sin mem kaj sin banis en kuvo.

Limeriko

Eniris Valono salonon
 kaj petis tre prave pardonon,
 ke hazarde li ternis.
 Kio tion koncernis,
 li kaŭzis kirlegan ciklonon.

—a	(Adjektiv)	kuv'	War				
—as	(Präsens)	limerik'	Lim				
ating'	erreichen	mal—	(G)	—a	(Adjektiv)	koncern'	betreffen
ban'	baden	mem	sel	ciklon'	Zyklon	li	er
diluv'	Sintflut	—n	(f)	—e	(Adverb)	—n	(Akkusativ)
dir'	sagen	—o	(f)	—eg	(Verstärkung)	—o	(Substantiv)
en	in	pluv'	1	—en	in, ein—	pardon'	verzeihen
est'	sein (Verb)	promen'		hazard'	zufällig	pet'	bitten
—et	(Verkleinerung)	sek'		ir'	gehen	prav'	Recht habend
hejm'	Heim	si		—is	(Vergangenheit)	salon'	Salon
—is	(Vergangenheit)	sia		kaj	und	tie	dort
ja	ja, doch	vir'		kaŭz'	verursachen	tio	das, jenes
kaj	und	vring		ke	daß	tern'	niesen
				kio	was	tre	sehr
				kir'	quirlen	Valon'	Wallone

Wenn Sie diesen Limerick herausbekommen
 Richard Schulz, Mein geliebtes Esperanto,
 DM 14,80

Wenn Sie diesen Limerick herausbekommen, sind Sie reif für:
 Richard Schulz, Mein geliebtes Esperanto, Bleicher Verlag,
 7016 Gerlingen, DM 14,80.

Tre efika Ŝulca varbado poŝtkartogranda

La ĝustan legadon de la teksto plifaciligas graslitere markita
 akcentado, kaj sub la limeriko mem troviĝas konciza klarigo de la
 Esperantaj vortoj kaj gramatikaĵoj – kaj fine aperas la alineo:

“Se vi kapablas diveni tiun ĉi limerikon, vi estas matura legi la
 libron 'Mia amata Esperanto' de Richard Schulz,
 Bleicher Eldonejo, DM 14.80“

– eble la “sekreto“, kial la libro jam atingis la 4-an eldonon...

La juna Ŝulco

Rüdiger SACHS

Ankaŭ Richard Schulz iam estis juna. Tio estas apenaŭ kredebla, ĉar konata li estas al ni kiel asketa blankharulo, altstatura aĝa ĝentlemano kun impona hartufo – tiom longhara, ke oni povis, ĉe la unua supraĵa ekvido, misidentigi lin, kun eksmoda kapvestaĵo kaj flirta-longa mantelo, kiel virinon. Sed la bildoj en la diversaj libroj montras – ĉu fotoĵoj, ĉu surmedalaj portretoj – klasike intelektan kapon, tre-ege viran.

Jes, Ŝulco ankaŭ iam estis juna. Kaj treege vira. Sed neniue Esperantujano tiam konis lin, kiu nur post sia pensiigo fariĝis Esperantisto. Ĉiuj liaj Esperantlingvaj publikigaĵoj – pli ol 3000 paĝoj – aperis nur en lia pensiula aĝo. Sed dum personaj renkontigoj li rakontis pri sia juneco kaj donis fascinan superrigardon pri sia antaŭEsperantista vivo kiel hamburga stratnabo, juna instruisto, stipendiulo en Francio – jam tiam desegnisto kaj poeto. Krom la bone konata esperantigita nomo Rikardo Ŝulco ekzistas verkoj sub diversaj kaŝnomoj – li estis “Franziskus“, “Franziskus R. Schulz“, “Franziskus im Schnoor“, kaj kiel Franz Iskus li eĉ gajnis literaturan premion. Impresis min speciale lia verko “Kadenzen, Bänkelsang, Kleine Lyrik und anderes“ (“Kadencoj, Friponaj Lidoj, Malgranda Liriko kaj aliaj“) sub la aŭtora nomo Franz Iskus, en kiu legiĝas – kun rilato al la poeziaĵoj en la teksto – je la fino jena priaŭtora vivoprikskribo:

“Franz Iskus estas la pseŭdonomo por Richard Schulz. Li naskiĝis 1906 kiel nepo de la komercisto Carl Heinrich Meyer kaj ekde tiam meditas nur pri siaj afliktoj. Kiel infano li dialogis kun “dodekaedro“ kaj dividis kun sia avino la naŭzon pri blatoj. Li ĉirkaŭvagadis en la Hamburga havenkvartalo Sanktpaŭlo, akompanis sian amikino al la rivero Elbo kaj enamiĝis al Josephine Baker. Kiel studento li frekventis la bohemianan vin-kelon de “Onklino Klarino“, kiu troviĝis en la malnova Hamburgo je la angulo de Brandsende kaj Raboisen, kaj dediĉis al ŝi sentimental-makabrajn lidojn. En tiu vinkelo li renkontiĝis kun Heinrich George. En la kriptoj de najbara preĝejo li postvivis la naziismon, devis sperti hispanan internigon kaj venis al Miran-

do ĉe Ebro, kie li ĉirkaŭigis la barakaron por internigitoj internflanke per dorndrata barilo. Plurfoje en sia vivo li havis la ŝancon rigardi de supre malsupren: unufoje de ponto, unufoje de la Strasburga katedralo kaj unufoje de ĉasista altembuskejo. Ĉiufoje li spertis kapturniĝon kaj, kelkfoje, mensogemon. Neniam li iris Italujen, sufiĉis al li la malkovroj en la geedza dormoĉambro. Li ellitiĝis pli frue ol sia edzino, estis amiko de *Lothar Schreyer* kaj ŝuldas dankon al *Hans Leip* pro la formo de la “kadenco”, kiel aliuloj al *Petrarca* pro tiu de la soneto. Li oficis en la gimnazia biblioteko por instruistoj, veturis unufoje kun siaj kolegoj al *Rellingen*, sonĝis pri ŝtelistoj, rezignis pri erinaco, rigardis en kinejo *Alexis Sorbas* kaj subite, post sendorma nokto, lasis sian ĝardenon kia ĝi estis, envagoniĝis en metroon kaj ekde tiam estas malaperinta kaj kun plezuro pretas, se petite, doni pluajn informojn.“

Homo, kiu tiel skribas, estas juna kaj ne fariĝas aĝa. Ho, kiel junaj liaj okuloj brilis dum rakontado pri tiamaj tempoj: kiel li, junulo, enamiĝinte “akompanas amikino al la rivero Elbo” kaj vagadas tra la sanktpaŭla (fi)havenkvartalo – ĝuste tie ja troviĝis ankaŭ la Hamburga Instituto pri Tropikaj Malsanoj, mia profesia laborejo dum jarcentkvarono...

Ŝulco verkis en sia gepatra kaj ankaŭ en aliaj lingvoj. Ekzistas germana, franca, hispana literaturoj kaj poeziaĵoj – la verkoj en Esperanto estas la daŭrigo de lia antaŭa krea forto en la gepatra kaj aliaj lingvoj, daŭrigado de komenca nacilingva poeziaĵo per internacilingva poeziaĵo. La vorton “Esperanto” li jam estis aŭdinta mallonge post la unua mondmilito, okaze de patrina kafoklaĉo, dum li ludis per sia knaba konstrukesto en la sama ĉambro. Kvankam impresis lin la rakonto pri “lingvo, kiun ĉiu povas facile lerni, kompreni kaj paroli” kaj kvankam tiam li vidis etan miniaturbibliotekan Esperanto-eldonaĵon, venkis tiam ne la “Internacia Lingvo” sed la ĵusa nova lerneja lingvo, la Franca.

En 1933/34 li estis “Asistanto por la germana lingvo” (“*Assistent de Langue Allemande*”) ĉe supera lernejo por knaboj en Francujo, pri kiuj tempo kaj spertoj li verkis pedagogian traktaton kun aldonaĵo pri du publikigoj de *Friedrich Fröbel* (Februaro 1934), resumita kaj verkita de *Richard Schulz*. Poste li fariĝis referendario ĉe supera mezlernejo en *Eppendorf/Hamburgo*. La Ŝulca okupiĝo pri Esperanto tamen devis atendi ĝis 1974 – nome ĝis pensiuligo de la profesia laboro kiel instruisto por Latino, Latinidaj lingvoj kaj Germaniko.

Se la nun bone konata esperantlingva pseŭdonomo “Rikardo Ŝulco” kun tiom multe da publikigaĵoj apartenas al “la maljuna Ŝulco”, tiam liaj antaŭaj verkoj apartenas al “la juna Ŝulco”. Nu, sub la nomo “*Franziskus*” aperis “*Von Gott und seiner Wirksamkeit*” (“Pri Dio kaj lia efikeco”, 1970) kaj “*Ich geh’ durch’s Leben*” (“Mi trapasas la vivon”, 1972) post antaŭa kolektaĵo kun la titolo “*Anruf*” (“Alvoko”, 1969. Nepublikigitaj estas “*Überzählige Manuskriptblätter zu ’Florilegisches Formen- und Versspiel des Romanisten Franziskus’*” (“Nebezonaĵaj manuskriptfolioj al ‘Antologiaj form- kaj versludoj de la romanisto Francisko’”, 1974) de iu *Franziskus R. Schulz* kiel eldonisto (kun la rimarko, ke ĉiuj ne per aŭtora nomo aparte markitaj poemoj estas tradukitaj aŭ propraj poemoj – inter tiuj ankaŭ franclingvaj – de *Franziskus*). Sen jarindikoj estas “*Ich bin für Jesus*” (“Pledo por Jesuo”), versaĵoj kaj meditiga prozo de iu *Franziskus im Schnoor* kaj “*Das Ding*” (“La aĵo”), limerikoj de *Franz Iskus*.

Oni rimarkas animan parencecon kun la franca teologo *Teilhard de Chardin*, kiun li laŭ kelkaj vivopriskriboj tre admiris kaj kies mondokoncepto similis al lia propra – kaj kiu devis sperti, eldirante la propran konvinkon (kiu deviis de la ĝenerala opinio), samajn dolorigajn nekomprenemon, malbonvolon kaj malamikecon kiel Ŝulco mem.

La Ŝulcaj verkoj en Esperanto ricevis de recenzistoj jen pereigajn batojn, jen plej altajn laŭdojn, kaj lian senton de izoliteco en Esperantujo pro miskompreno pri diverskonceptaj prilingvaj opinioj oni kelkfoje povis subaŭskulti dum liaj rakontoj pri pli fruaj tempoj. Li tamen gardis sian junecan humuron. Tion atestas la kajero “*Werbung muss sein...*” (“Necesas varbado...”), kiun li eldonis 1991 – do kiel 85-jarulo – kun spritaj/spicaj (bedaŭrinde nur germanlingvaj) fikciaj varbadoj “prenitaj el la nuntempa komerca vivo”. Jam por sia unua plej grava libro, la kvazaŭa lernolibro “*Mia amata Esperanto*” li en ne antaŭe konata formo varbis, nome per memfaritaj limerikoj. En tiu varbadoformo montriĝas liaj spriteco, ŝercemo – kaj juneco.

Aŭtora adreso

Prof. Dr. Rüdiger SACHS


Vor dem Brückentor 3

DE – 37269 – E s c h w e g e / Germanio

<isaesachs@aol.com>

Priaŭtora informo

Veterinaro. Parazitologo. Esperantisto.



Ŝulco Rikardo

* 1906-07-12 † 1997-10-26

(Fotaĵa originalo kaj diĝita variaĵo fare de Rita Rössler-Buckel)

Rikardo Ŝulco, la pentristo kaj grafikisto

Rita RÖSSLER-BUCKEL

Enkonduko

Kiu iam rigardis, atente trafolumis la librojn de Rikardo Ŝulco, povis konstati, ke tiu gramatikisto, lingvofilozofo kaj beletra aŭtoro havis ne nur fortan inklinon al la pentra kaj grafika artoj, sed ankaŭ mem disponis pri certa talento en tiuj ĉi kampoj. Ja ekzistas multaj senbildaj publikigaĵoj liaj, ekzemple la klasikaj “Pledo por unueca lingvo” kaj “Sur la vojoj de la Analiza Skolo”, sed plurajn li ornamis per propraj aŭ fremdaj grafikaĵoj, malpli ofte per pentraĵoj aŭ medaloj.

En tiuj libroj oni forte sentas lian bezonon de kompleteco en la arta kampo. Li ŝatis kunligi ĉion, kio estas ebla inter du kovriloj: teksto en originala lingvo + traduko en alian + ilustraĵoj + fotoj + foje eĉ muziknotoj. Por li la mondo estis bunta, varia, ĉion inkludanta, kaj li elektis por si kaj liveris al la publiko la por la temo plej ampleksan kadron. Li vere estis artisto, certe plej profesiece en la lingvoj, sed almenaŭ amatore en la bilda arto. Kompare kun desegnaĵoj de Ĵano Lajpo, kiujn li iam sonete komentis, liaj “agregaĵoj” ne aspektas malpli kvalitaj laŭ inventemo, teĥniko kaj arta sento. Kaj li nomas tian konatan tekstoautoron unualoke “grafikisto, pentristo”, antaŭ “verkisto kaj poeto.”

En pli fruaj jaroj, en la Franclingva poema memportreto “*Les dadas du vieux retraité*” (“La ŝatokupoj de la maljuna retiriĝinto”, 1969) li ankoraŭ bedaŭras, ke la naturo ne pli bone dotis lin, kaj bone observante la verajn pentristojn (“*J’entends des peintres le concert*”) li konstatas, ke li mem kapablas pentri nur naive (“*Je fais naïvement peinture*”). Tamen insiste li ripetas poemofine: “*J’exécute au pastel peinture*” (“Mi pentras laŭ paŝtela teĥniko”).

Pli poste li sentis sin serioza verkisto sur papero kaj tolo. Tion pravas la ne malofta memtaksado kiel – almenaŭ – grafikisto. En “La